FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 4 | Oktobro/Decembro 2002



Schlossplatz mit Georgentor, Schlossturm und Katholische Hofkirche

Dresden
Internationaler Eisenbahner-Esperanto-Kongress
10. – 16. Mai 2003

Dresden erwartet uns

Dresden, Hauptstadt des Freistaates Sachsen, empfängt vom 10. bis 16. Mai 2003 Eisenbahner aus ganz Europa zum 55. Kongress des Internationalen Esperanto-Verbandes der Eisenbahner (IFEF). Wir, die Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung in der Stiftung Bahn-Sozialwerk, laden herzlich dazu ein, zusammen mit unseren ausländischen Sprachfreuden am internationalen Kongress teilzunehmen. Das umfangreiche Programm wird den Wünschen der Teilnehmer sicher gerecht werden. In den Arbeitssitzungen behandelt der IFEF-Vorstand mit den Delegierten der Landesverbände das vergangene Geschehen und die künftigen Aufgaben. In den Fachvorträgen erfahren wir Neues bei den verschiedenen Bahnen oder über den Fortgang bei der Übersetzung neuer Eisenbahnfachwörter.

Im Beiprogramm fehlt nicht das traditionelle Bankett mit anschließendem Ball. Auch die kulturellen und touristischen Belange kommen nicht zu kurz. An einem der Abende singt und tanzt eine Erzgebirgsgruppe und ein sorbisches Dorfensemble. Ein anderer Abend ist der Sangeskunst gewidmet, in Esperanto versteht sich, nicht zu vergessen ein Konzert mit klassischer Musik.

Dresden, unsere Kongressstadt, entwickelte sich im Mittelalter neben einer Burg des Markgrafen, die später zu einer Residenz ausgebaut wurde. Im 18. Jahrhundert entstanden weithin berühmte Bauwerke im Barockstil, so der Zwinger, die Hofkirche und die Frauenkirche sowie die Brühlsche Terrasse. Der zweite Weltkrieg hinterließ große Schäden. Sie konnten nur teilweise behoben werden. Wir werden die wieder entstandenen Schönheiten des so genannten Elbflorenz besichtigen, und zwar am Sonntag zu Fuß sowie am Dienstag mit der Straßenbahn.

Während der Kongresswoche werden einige Fahrten in das Umland veranstaltet. Am Mittwoch führt eine ganztägige Busfahrt nach Pillnitz zur ehemaligen Sommerresidenz der sächsischen Könige, dann zur felsigen Bastei in der Sächsischen Schweiz. Auf der Rückfahrt mit dem Schiff zeigt das Elbeufer seine baulichen Schönheiten. Eine preislich günstigere Variante mit Bahn, Schiff und zu Fuß führt am selben Tag ebenfalls in die Sächsische Schweiz bis zum Ort Rathen, inmitten großartiger Felsen gelegen. Am Donnerstag wartet die dampfbetriebene Schmalspurbahn bei Radebeul auf die Eisenbahnfreunde. Nach Besichtigung historischer Fahrzeuge geht die Fahrt zur prächtigen viertürmigen Moritzburg. Zum Halbtagsausflug gehört auch eine Kaffeetafel. Gut beraten sind die Teilnehmer, die nach dem Kongress einen Tag und eine Übernachtung zulegen, um am Samstag die benachbarte Stadt Meißen zu besuchen. Dort wird die Kathedrale, die Albrechtsburg und vor allem die berühmte Porzellanmanufaktur besichtigt. Der Anmeldevordruck enthält alle Preise für die Ausflüge.

Der deutsche Landesverband als der Veranstalter bittet, die Teilnahme baldmöglichst durch eine Anmeldung zu bestätigen. Anmeldevordrucke sind bei Ihrem Bezirksbeauftragten erhältlich oder über die Anschrift: „55a IFEF-kongreso, Postfach 100425, 61144 Friedberg; Tel.: 0631 4617". Wir freuen uns, Sie im Mai 2003 in Dresden begrüßen zu dürfen.

Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung im BSW

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Aŭtuna jarkunveno de GEFA



Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) okazigis sian jarkunvenon ankaŭ en 2002. Kvindek geamikoj de Esperanto, inter ili ankaŭ gastoj el kvin aliaj landoj, sekvis la inviton al Baiersbronn, kuracloko en la sudgermana montaro Nigra Arbaro. Jam la alveturo tra koloriĉaj arbaroj pligrandigis la antaŭĝojon pri agrabla semajnfino inter la 11a kaj 13a oktobro 2002. En Baiersbronn atendis la alvenintojn eleganta hotelo de la Fervoja Soziala Organizaĵo (BSW). Vere afabla servistaro dorlotis la gastojn. Malgraŭ portempa nebulo la elrigardo al la proksima parko kaj ĉirkaŭaj montoj estis ĝuinda.

Dum la laborkunsido, gvidita de Rolf Terjung, GEFA-estraro kaj komisiitoj honore memoris pri la lastjare mortintoj, antaŭ ol ili pritraktis pasintajn aranĝojn kaj venontajn taskojn. Bedaŭrinde la perspektivoj de GEFA aspektas ne tro favore pro konataj kaŭzoj. Aliaflanke bone progresas la preparlaboroj por certigi sukcesplenan IFEF-kongreson venontjare en Dresden. Bedaŭrinde la reprezentanto de BSW estis lastmomente malhelpata partopreni la jarkunvenon. Dum tiu sabata mateno la ceteraj kongresanoj ekskursis per aŭtobuso tra la granda arealo de la komunumo Baiersbronn.

Post komuna tagmanĝo en la hotela restoracio sekvis la tradicia aŭtobusa ekskurso. Celo estis la prapatra kastelo de la gento Hohenzollern sur alta monto. Malgraŭ pluvema vetero ofertis sin interesa rondiro tra la pordo- kaj turoriĉa kastelo konstruita en la nuna aspekto en la 19a jarcento. Juna gvidantino klarigis signifon kaj historion de la lukse aspektantaj salonegoj, kiujn de tempo al tempo la posteuloj de la iam imperiestra familio uzas. Post kafopaŭzo en la kastela restoracio la ekskursantoj atingis sur kruda strato la aŭtobuson en la valo. Postrestis impresiga memoro pri unika kastelo.

Kulmino de la jarkunveno estis la festvespero. Siegfried Krüger, la organizanto, kore bonvenigis kun la hotela estrino kaj la GEFA-prezidanto la kunvenintojn. Sekve salutas de eksterlandaj gastoj: Dina Deloyer (Belgio), Elena Mateeva (Bulgario), Jaques Dony (Francio), Emil Todorache (Romanio) kaj Anneliese Fiechter (Svisio). Kio sekvis, estis preskaŭ duhora plezuro, ĝojo kaj miro pri la elstara, bone konata sorĉisto Trixini. Dum la prezentado ŝprucis el lia buŝo unu ŝerco post la alia. La aplaŭdo ne volis ĉesi. Sed la vespero invitis ankaŭ per agrabla muziko al dancado ĝis noktmezo.

Antaŭ la dimanĉa matineo kolektiĝis kongresanoj por komune preĝi kaj kanti. Trixini montris per multnombraj diapozitivoj sian kolekton de telefonkartoj el diversaj landoj. Dipl.-Inĝ. Poethke prenzentis bildojn pri la ŝanĝkonstruota ĉefstacio Stuttgart sur la ekrano. Interesa fakprelego. Finiĝis la bonege organizita 46a jarkunveno de GEFA. Tia ne okazos en 2003 pro la samjara IFEF-kongreso en Dresden. Ni apelacias al niaj membroj nepre partopreni tiun kongreson. Vi estas tie kore bonvenaj. W.B.



Sorĉisto Trixini kun Walter Ullmann

Redaktfino por FE 1/2003 estos la 15.02.2003
Stiftung Bahn-Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schritfleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel/Fax (06 61) 7 76 27, E-Mail: f.lautenbach@fulda-online.de
und Horst Jasmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361, E-Mail: horst.jasmann@web.de

Jarraporto pri la periodo de jarkunveno Bad Salzuflen, Oktobro 2001 ĝis jarkunveno Baiersbronn, Oktobro 2002

Enkonduko

La situacio en GEFA ne multe sanĝiĝis en la pasinta jaro. La nombroj de niaj membroj denove malkreskis. Ni perdis 19 membrojn en 2001/2002. Ni nepre devas varbi novajn membrojn, prefere junajn. Ankaŭ instigu membri al GEFA viajn familianojn kaj grupanojn. Nia modera jarkotizo vere ne malhelpas tion. Esperantistoj grandskale estas optismaj. (La nomo ŝuldigas tion.) Tial ne ĉesu vian laboron por Esperanto, por GEFA kaj por Fonduso BSW, kiu tre subtenis nin.

Mortintoj

Regiono Nordwest: 10.04.2002, Andreas Mann, 53jara
Regiono Mitte: 17.12.2001, Astrid Bohuschke, 57jara
Regiono Südwest: 21.10.2001, Willi Schäfer, 87jara

Funkciuloj:

Inter la funkciuloj en GEFA ne okazis ŝanĝoj en la lasta jaro. Niaj novaj redaktoroj Fritz Lautenbach kaj Horst Jasmann, bone laboris. En la regiono Südwest, en kiu nun pli ol unu jaron distriktkomisiito Siegfried Krüger administras tri distriktojn, (Saarbrücken, Stuttgart kaj Karlsruhe), ĉio bone funkcias. En la regiono West faras tiun laboron, ankaŭ jam pli ol unu jaron, por la tuta regiono (distriktoj Essen kaj Köln) kun siaj plej multaj GEFA-membroj, distriktkomisiito Manfred Retzlaff. La decido de komisiito por publikaj rilatoj, Willi Barnickel, en certa kadro plulabori, montriĝis favora por GEFA.
En tiu loko mi dankas al ĉiuj kunlaborantoj pro la farita laboro.

Kursoj

Memstaraj Esperanto-kursoj sub respondeco de GEFA ne okazis, sed en kelkaj distriktoj okazas kursoj en kunlaboro kun lokaj Esperanto-grupoj, eks. en Bremen kaj Münster. Sed tie ankaŭ mankas fervojistoj.

Kunlaboro kun IFEF

Partoprenis en la IFK en Plovdiv, Bulgario, ĉ. 230 personoj. Ĉar Plovdiv malfacile estas atingebla, partoprenis el Germanio nur naŭ personoj. Ĉeftemo tie estis: „La reformo en Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj – paŝo al integriĝo al la Eŭropa Transporta Sistemo". La plej grava decido de komitatanoj tie estis la definitiva invito al IFK en Dresden, Germanio, en 2003. La ĝenerala kunlaboro kun IFEF estas sen problemoj.

Faka kunlaboro

Nia membro Dr. Heinz Hoffmann daŭre estas sekretario de la „Terminara Sekcio" en la „Faka Komisiono". Li ankaŭ reprezentas la „Fakan Komisionon" de IFEF en la terminologia grupo de UIC. Por la IFK Dresden 2003 Bodo Ehrlich verkas la fakan ĉeftemon.

Kunlaboro kun Fonduso BSW

La kunlaboro kun Fonduso BSW konstante estas tre bona. Nova estro pri kulturo, komunikado kaj libertempo estiĝis Tobias Schwab. (Hans-Joachim Ruth estiĝis membro de entreprenkonsilantaro.) BSW presas nian „Fervoja(n) Esperantisto(n)" kaj ekspedas ĝin laŭ nia dissendadlisto. Ĝi ankaŭ subtenas nin finance. De tempo al tempo aperas en „BSW-Magazin" artikolon pri GEFA, verkita de Willi Barnickel.

Aranĝoj kaj kontaktoj

Raporton pri la nunjara (2002) 46a jarkunveno en Baiersbronn, vi poste povas legi en unu el la sekvontaj numeroj de FE. En la jaro 2003 pro IFK en Dresden ne okazos jarkunveno, sed nur kunsidoj de la laborkomisiono kaj kunsidoj kune kun la distriktkomisiitoj kaj komisiitoj por apartaj taskoj. Ankaŭ la renkontiĝo de GEFA-veteranoj pro la sama kauzo ne okazos. La ĉijara renkontiĝo de la veteranoj okazis je la 19a de aprilo en la historiplena urbo Nürnberg. (Vidu raporton en FE 2/2002.) En la skisemajno, 16/24.02.2002, en Predeal, Rumanio, neniu el Germanio partoprenis. Prezidanto de GEFA, Joachim Gießner, invitis GEFA-anojn partopreni en Esperanto-festo, (3/4.11.2001), en Herzberg, okaze de 25a jubileo de Esperanto-Asocio Südharz. Multaj Esperantistoj sekvis la inviton, ankaŭ kelkaj fervojistoj. GEFA-membroj partoprenis en diversaj landaj Esperanto-renkontiĝoj. En la kongreso de GEA en Husum, (18/20.05. 2002), Bodo Ehrlich salutis la kongreson en la nomo de GEFA. Tie ankaŭ okazis kunveno de la partoprenantaj fervojistoj. En la UEA-kongreso en Fortaleza, Brasilo, kunvenis en la kadro de fakkunvenoj, fervojistoj el ĉiuj mondpartoj, sub aŭspicio de IFEF. GEFA-grupoj pli-malpli regule kunvenas kaj multaj membroj de GEFA flegas privatajn kontaktojn kun kolegoj en multaj landoj en ĉiuj kontinentoj.

Informado kaj varbado

Nia organo „Fervoja Esperantisto" aperas kvarfoje jare, de oktobro 2001 ĝis oktobro 2002 kun 44 paĝoj, inklusive de aliĝilo por Jarkunveno en Baiersbronn kaj kun 13 bildoj. Ĝi aperas parte germane kaj parte en Esperanto. Samtempe ĝi ankaŭ servas kiel varbilo. Pri internaciaj aferoj informas sesfoje jare la „Internacia Fervojisto", organo de IFEF. Kelkaj grupoj varbis dum urbofestoj aŭ aliaj okazaĝoj por Esperanto. Aperis kelkaj artikoloj en ĉiutagaj ĵurnaloj. Mankas informoj en „Internet" pri GEFA.

Perspektivo

Estas malfacile ion skribi pri nia perspektivo. Mankas tie ĉi junaj homoj kaj fervojistoj, kiuj pretas lerni nian lingvon, kvankam la opinio pri Esperanto plejparte estas pozitiva. Sed Esperanto certe ne mortos. En Fortaleza, en la UEA-kongreso ekzemple, proksimume triono el la partoprenantoj estis junuloj.

Rolf Terjung, ĉefkomisiito Esperanto



Willi 29.03.1922 Margret 06.08.1932
Brandenburg

Kara paco-batalanto,
surinsula ferianto,
en la Norda Maro fore,
mi gratulas vin tre kore,
dezirante: ‚Restu sana!'
En la nomo de l' Germana
„esperanta" Fervojista
Asoci' Esperantista.

Paca batalanto kara,
sur insulo nordamara,
dankas kore ni pro via
laborado energia
por afero kara nia
kaj pro engaĝiĝo via
por la Lingv' Internacia,
ankaŭ en la nom' de nia
Organizo Sociala,
por la lukto pacbatala,
nun jam pli ol kvindekjara.
Nun ripozu, mia kara!
Faru ne plu multajn agojn!
Ĝuu kelkajn belajn tagojn
kun edzino via kara
ĉe la bordo nordamara!

Ni la flagon supren tenos,
ĝis aliaj tempoj venos.
Pensas mi: Ni kune festos,
kiam ree ni kunestos
en la urbo Monastero,
apud glaso da biero
aŭ trinkante iun vinon.
Vi salutu la edzinon!

Kun koraj salutoj je la 150a naskiĝtago (Willi 80 kaj Margret 70)
Via Germana Esperanta Fervojista Asocio

Omaĝe al Margret kaj Willi Brandenburg

Margret kaj Willi konatiĝis en Münster (Westfalen) post la milito, kiam Willi gvidis tie Esperanto-kurson. Ŝi do estis unu el liaj gelernantoj. Ili enamiĝis kaj geedziĝis. Ili ekhavis la tri infanojn Ulrich, Guido kaj Judith, kiuj ĉiuj fariĝis denaskaj esperantistoj. En 2000 la tuta familio festis la oran geedziĝfeston

Ili havis kontaktojn kun esperantistoj en la tuta mondo kaj vizitis tre multajn Esperanto-kongresojn.

En 1958 Margret gvidis la infan-kongreseton ĉe la Universala Kongreso en Mainz. Ŝi estris dum jaroj la subtenan societon por la brazila infanbieno Bona Espero (Förderverein Bona Espero e.V.) kaj kunlaboris dumtempe en la redakcia stabo de la Esperanto-revuo "Monato".

Willi gvidis dum multaj jaroj la fervojistan Esperanto-grupon en Münster (Westfalen). En 1962 kaj 1992 Willi kunorganizis la GEFA-jarkunvenojn en Münster kaj organizis la 60an GEA-kongreson 1982 en Münster. Li laboris en la ekzamenkomisiono de GEFA kaj estis dumtempe ankaŭ prezidanto de Germana Esperanta Fervojista Asocio.

Certe tiu retrorigardo estas tute ne kompleta. Ili do faris multegon por nia komuna afero, nia lingvo Esperanto, kaj gajnis multajn meritojn pro tio. Ni ĉiuj ŝuldas al ili multan dankon.

BSW-Jahrestagung Bezirk Frankfurt in Bad Ems

Die Stiftung BSW, Region Mitte, Geschäftsstelle Frankfurt lud vom 8. bis 9.11.2002 zur Jahrestagung ins Haus Lindenbach/Bad Ems im romantischen Lahntal ein. U.a. waren anwesend Vorsitzende der Ortsstellen, Mitglieder der Bezirksvertretung, Vertreter der Gewerkschaften und auch die Beauftragten der Kultur- und Freizeitgruppen. Zur Tagesordnung gehörten u. a. Aktuelles zu den Stiftungen BSW und EWH, Lagebericht zum Geschäftsbereich Frankfurt und auch Berichte der Teilnehmer.

So informierte der Beauftragte für Esperanto über die Sprache als solche, auch über die Möglichkeiten, die die Internationale Sprache bietet und dergl. mehr. Der informative Vortrag war gewürzt mit gesanglichen Einlagen in Esperanto unter Einbeziehung der Teilnehmerinnen und Teilnehmer. Besonders lud der Informant zum Kongress des Internationalen Eisenbahner-Esperanto Verbandes in 2003 nach Dresden ein. Ergänzend lagen Zeitschriften und Bücher neuesten Datums und Info-Blätter auf. Die Ausführungen über Esperanto fanden besonderen Anklang.

Egon Kiefer

El la Duisburga Esperantogrupo

Estas ĉiam ne facila decido, ĉu propagandocele raporti germane por atingi ankaŭ ne tiom Esperanto-spertulojn aŭ raporti en Esperanto por kontentigi Esperanto-parolantojn. Do, lastan fojon mi skribis germane pri la vivo en nia Esperantogrupo kaj tial nun en Esperanto.

Kiel ĉiam, ni dufoje monate renkontiĝas en ĉambro de paroĥo en Duisburg-Neudorf (kontraŭ lupago, kompreneble). Ĉiufoje ni pritraktas alian temon, kiu estis elpensita, ellaborita kaj prelegita de klubmembro laŭvice. (Ĝis nun ĉiu pli-malpli sukcesis en tiu kampo.) Ĉar tiuj klubvesperoj ne sufiĉas, ni ankaŭ iniciatas ekskursojn al aliaj Esperanto okazaĵoj.

Ĉifoje ni vizitis la „Kvinan aŭtunan renkontiĝon" de la „Krefeldaj Esperantistoj". Sabaton, la 26an de oktobro 2002, frumatene, ni ekveturis per aŭtomobilo por sufiĉe frue atingi la renkontejon, ĉar oni tie ofertis al ni matenmanĝon. Kolektiĝis ĉirkaŭ 50 Esperantistoj, ankaŭ el eksterlandoj, kiel Nederlando, Francio, Belgio, Ruslando, Bulgario kaj eĉ el Vestfalio. Esperantistoj ĉiam multe rakontas kaj babilas. Verŝajne tio devenas de tio, ĉar ili ĉiam estas survoje, prefere en aliaj urboj kaj landoj, por tie gustumi matenmanĝojn. Sed fine, post multfoja admono de Rosa Ebel, ni trovis tempon por viziti la skulptiston, pentriston kaj vere mult-iston de moderna arto, Armin Küpper, kaj lia „helpantistino", la dekjaraĝa filino. Lia (aŭ ilia) ateliero estas vere vidinda. Multaj malgrandaj kaj grandaj artobjektoj staris aŭ kuŝis en la korto. Ĉu kelkaj figuroj estis viraj aŭ virinaj, oni ne povis ekkoni, ĉar ili ne havis diferencigajn signojn. Sed estis belaj esceptoj. Post tagmanĝo ni vizitis la mezepokan kastelon Burg Linn, promenis tra belaj stratetoj kaj tra la kastela parko. Poste ni ankoraŭ kunsidis kafoklaĉante kelkajn horojn ĝis malfrua posttagmezo.

Estis malenua, bela tago.

Rolf Terjung

Ein treues Mitglied ist von uns gegangen

HORST KRAPALIS

Er starb am 24. September 2002 kurz vor seinem 80. Geburtstag. Mehr als 25 Jahre war er Mitglied der Bremer Eisenbahner Esperanto-Gruppe. Er hat an einigen Kongressen teilgenommen, bis ihn eine Herzkrankheit an diesen Aktivitäten hinderte. Er nahm an dem Leben der Gruppe regen Anteil. In dankbarer Verbundenheit werden wir seiner gedenken. Er ruhe in Frieden! Wir kondolieren aufrichtig seiner Ehefrau.

Dieter Hartig

Lösung des Kreuzwortzahlenrätsels aus Nr. 3/2002:

1. F, 2. V, 3. J, 4. B, 5. E, 6. R, 7. O, 8. K, 9. N, 10. U, 11. T, 12. A, 13. S, 14. I, 15. C, 16. P, 17. L.

Waagrecht: fervojo, EAB, nek, lue, spektas, te′, si, nun, oficejo.

Senkrecht: fenestro, PE, rekte, ni, va, kruc′, oblat′, ne, as, ofensivo.

Bremen

Gaja ĝardenfesto en nova ĝardeno

La 24an de aŭgusto kunvenis 20 el niaj grupanoj en la ĝardeno de Ruth Bohn. Ankaŭ lastjare ni festis nian tradician feston en la ĝardeno de Ruth, sed estis adiaŭa afero, ĉar la ĝardeno estis denoncita. Ruth serĉis kaj trovis alian, multe pli belan, ĝardenon. Ĝi estas kaŝita kvazaŭ perlo en konko, en iom fora loko. Ni ĉiuj admiris la belan lokon, la beletan duĉambran dometon kaj la gazonon kun ventmuelejo - mallonge: Ni ĝojis kun Ruth pri tiu paradizo kaj deziris al Ruth kaj ŝia fratino tie ankoraŭ multajn feliĉajn jarojn.

Alia kaŭzo instigis Ruth inviti: Ŝi festis sian 70-an naskiĝtagon in formo de ĝardenfesto por nia grupo. Ni ĉiuj gratulis tre kore kaj bondeziris.

La suno brilis kaj ni ĉiuj travivis feliĉan tempon. Montriĝis denove, ke ĝardeno estas paradiso por infanoj. Niaj plej junaj Krüger-ĝemeloj tuj sentis sin hejmece kaj ludis diversmaniere, rigardis mire la multajn belajn florojn - ili estis la tutan tempon plene okupitaj, ni ankaŭ per manĝado de la diversaj salatoj kaj viandaĵoj.

Minacis ja nuboj sur la ĉielo, kiun ni nur konstatis, kiam forta ventblovo renversis la tenton kaj samtempe ekpluvis. Nun okazis, kiun mi ĉiam mire observis: estas neimagebla, kiom da gajaj homoj povas esti en ĝardena domo. La sofo ĝemas pro ŝarĝo kaj seĝoj estis duoble okupitaj kaj la „salono" estis plenŝtopita kvazaŭ haringoj en konservujo; sed regis gajeco kaj vigla babilado. Estis eĉ loko levi glasojn kaj trinki je la sano de nia kara gastigantino.

Eĉ la fulmotondro ne ĝenis nin - ĝis venis la tempo adiaŭi. Bodo Ehrlich kaj familio Kruse devis bicikli hejmen kaj la aŭtomobiloj estis parkitaj sur fora parkejo. Unu el ni kuraĝis kuri tra la pluvo kaj transportis taksie la aŭtomobilistojn.

La unua parto de la ĝardenfesto, en sunbrilo estis bela, la dua parto en la kabano estis gaja kaj ne malpli bela.

Kun danko pri la bela kunveno ni adiaŭis, ne malgajaj, ĉar ni jam scias, kie la sekvontjara ĝardenfesto okazos.

Hg

Das Prachtexemplar

In des Gartens schönster Stelle,
da wuchs ein Pflänzchen, auf die Schnelle,
das war ein prächtig´ Exemplar,
und hatte reichlich Blüten gar.

Wurde gegossen und gepflegt . . .
Gedüngt, bestaunt und stets gehegt,
bis letztlich dieses Exemplar -
so merkte man, nur Unkraut war.



Fervojaj informoj

Sur la nove konstruita fervojlinio Köln – Frankfurt/Main ĉiutage trafikos ekde la vintra horarŝanĝo (15.12.2002) 54 grandrapidaj pasaĝertrajnoj. Ili haltas alterne en la novaj stacioj Siegburg, Montabaur kaj Limburg, sed regule en Frankfurt-Flughafen. Aliaj trajnoj veturas tra Mainz kaj Wiesbaden. En 2004 la trajnoj haltos ankaŭ en la flughavena stacio Köln/Bonn.

La fervojinterna telefonreto de la Germana Fervojo (DB) apartenis depost 1996 grandparte al la privata entrepreno Arcor. En 2002 la DB denove ricevis la kabloreton kaj specifajn instalaĵojn. Krome 3700 kunlaborantoj fariĝis denove fervojistoj. DB kaj Arcor regulis per ampleksa kontrakto la reciprokajn rajtojn pri utiligo de telekomunikaĵo.

Svisaj Federaciaj Fervojoj (SBB) transprenis la internacian signalan kaj sekurigan sistemon ETCS. Ĝi funkcias radiofone inter regadejoj kaj trajnoj, unue provmaniere, sur la fervojlinio Zofingen kaj Sempach.

Nova, plurkurenta lokomovo EG 3100 ebligas transporton de vartrajnoj sen halto en la limstacioj inter Svedio kaj Danio unuflanke kaj Germanio kaj aliaj landoj aliaflanke.

Sur la fervoja relaro en Germanio okazas ĉiujare ĉirkaŭ mil sinmortigoj.

Posedantoj de legitimilo BahnCard, kiuj disponas pri kreditkarto, povas per propra komputilo eldoni provizoran bileton ĝis unu horo antaŭ la ekveturo.

Depost 1972 en Germanio estas venditaj al gejunuloj preskaŭ 1,1 milionoj da Inter-Rail-biletoj, en tuta Eŭropo estis sep milionoj.

Aĉeteblas horarlibro kun fotoj de germanaj muzeaj fervojoj. Sur 150 paĝoj povas informi sin amikoj de nostalgiaj trajnoj, kiam kaj sur kiuj fervojlinioj trafikas historiaj trajnoj (ISBN 3.928959-35-2).

Germana Fervojo (DB) instruas estontajn komercistojn pri fervojtrafika servo kune kun gekolegoj el Ĉeĥio, Danio, Francio kaj Polio dum dujara seminario. La gejunuloj lernas ankaŭ la lingvon de sia najbara lando.

Sekve de konkurso estos ekspluatata ekde decembro 2002 la bavara fervojlinio inter Weiden kaj Regensburg per la privata Vogtlandfervojo. Tiu entrepreno ofertos la fervojan servon je pli favora prezo ol la Germana Fervojo.

Kelkaj eŭropaj fervojoj projektas novan grandrapidan novan pasaĝertrajnon, anglalingve High-Speed-Train Europe (HTC). Tiu trajno devos veturi senprobleme sur diverslandaj fervojrelaroj.

El BahnZeit 4, 5, 6/2002 W.B.



Ĝojigan Kristnaskon
Pacon kaj feliĉon
en la Nova Jaro!

BELIEBTE DEUTSCHE WEIHNACHTSLIEDER
MIT ORGELBEGLEITUNG AUF CD

übersetzt ins Esperanto von Joachim Gießner
Preis 12 € plus Porto
Bitte bestellen bei: Otto Kern, Berliner Str. 9, 37412 Herzberg am Harz